

# Germana Esperanto-Biblioteko, Aalen: Reguloj por la Komputila Registrado

Martin Weichert

(*Malneto*)

## 1 Enkonduko

Jen la reguloj por la enkomputila registrado, laŭ kiuj mi konformigis la Aalen-an katalogon kiam mi prilaboris la datumojn en la jaroj ĉ. 1987 - 1989.

La regulojn mi devis krei mem, ĉar mi ricevis la nuran datumaron sen iu skriba regularo pri enkatalogigo, kiu tiam (kaj ŝajne ĝis nun) ne ekzistis. La datumaro estis pluraspekte prilaborenda kaj korektenda, sed (krom la granda nombro de tajp- kaj similaj eraroj) tute ne estis evidente *kiaj* ŝanĝoj estis farendaj. Montriĝis, ke kiel efektivan taskon mi devis solvi du problemojn samtempe, kiuj influis sin reciproke:

1. krei regularon por la komputila registrado, kaj
2. korekti la datumaron,

tiel ke la fina datumaro estu kongrua al tiu regularo, aŭ inverse: la regularo kongrua al la datumaro.

En la plenumo de tiu taskoduo mi devis atenti jenajn kadrajn kondiĉojn:

- a. La regularo estu laŭeble proksima al iuj (sed kiuj?) naciaj aŭ internaciaj normoj por bibliografiado.
- b. La regularo estu laŭeble proksima al la datumoj kiaj ili jam ekzistas sur la slipoj kaj entajpitaj en la datumaro.
- c. La regularo estu tia, ke la libroforma katalogo produktota el la datumaro estu plejeble utila, serĉebla laŭ plej diversaj kriterioj.
- ĉ. La regularo estu ne nenecese komplika.
- d. La regularo atentu aparte la bezonojn de biblioteko kiu estas: esperanta, german(i)a, kaj multlingva.
- e. La regularo estu sufiĉe fleksebla por permesi registri iom nekutimajn aŭ problemajn librojn.
- f. La regularo estu efektive (kaj, laŭeble, ankaŭ efike) uzebla per la komputila aparataro kaj programaro kiun mi disponis.
- g. La regularo estu sekvota ankaŭ de aliaj, estontaj uzantoj de la katalogo post mi, kiuj entajpos novajn datumojn.

Kompreneble, tiuj kondiĉoj aŭ postuloj estas parte inter si kontraŭaj. Mi devis do ofte trovi taŭgajn kompromisojn. Mi esperas ke la decidoj kiujn mi faris laŭ mi bontrovo, montriĝu taŭgaj en la praktiko, kiel ili montris sin taŭgaj almenaŭ jam en la praktika laboro kiun mi mem plenumis pri la datumaro.

Mi komentu kelkajn el la supre menciitaj kadraj kondiĉoj kaj kiel mi frontis ilin.

a. Cinikulo diras: „La bona pri normoj estas, ke ekzistas tiom da ili ke ĉiu povas elekti por si la preferatan.“ Ekzistas abundo diversaj bibliografiaj normoj, laŭ diversaj landoj, diversaj lingvoj, diversaj specoj de bibliotekoj, naciaj aŭ internaciaj ktp. Esperantujo kiel „lando“ ankoraŭ ne havas propran bibliografian normon kiun mi povintus elekti por blinde sekvi, kaj krome mi estis devigata atenti la aliajn menciitajn kadrajn kondiĉojn. Mi do elektis ne plene sekvi iun ekzistantan normon aŭ regularon; tamen la regularo kiun mi kreis plej multe orientiĝas laŭ la germana normo RAK, „Regeln fuer die Alphabetische Katalogisierung“.

b. Kompreneble plej facile estus por mi, se mi lasus la datumaron kun laŭeble plej malmulte da ŝanĝoj. Tamen pluraj el la decidoj kiujn mi faris por la regularo devigis min konsekvence adapti multon en la datumaro mem. Kelkaj el tiuj laborozaj ŝanĝoj estis la kreo de apartaj datumkampoj KONTRIB(UANTOJ), SERIO kaj VOLUMO kaj ISBN. Por ĉiu nove kreita kampo mi devis eltiri la koncernan informon el la malĝusta fako en kiu ĝi troviĝis (plej ofte el la multe trogranda kampo SUBTIT), aŭ el iu alia informfonto. Apartan atenton ricevis la verkoj kun formalaj titoloj (vd. sube), kie ĉiu unuopa enskribo devis esti rigore reskribita post kreo de koncernaj reguloj.

c. Tiun kondiĉon mi plej alte atentis. La papera eldono de la produktita librokatalogo ebligas aliron laŭ sistema klasifo, laŭ aŭtoro, laŭ titolo, kaj laŭ seria aparteno. Verkojn kun formalaj titoloj kutime eblas trovi laŭ eldoninta organizo aŭ kongreso kiel ankaŭ laŭ jaro. La enkomputila katalogo, kompreneble, ebligas per plenteksta serĉo ankoraŭ aliajn alirojn.

ĉ. Kelkajn regulojn en RAK, ekzemple pri la nomado de Kongresoj, mi konsideris tro komplikaj por la necesoj de tiu ĉi katalogo. Kie la plena apliko de RAK-aj aŭ internaciaj reguloj postulus: „**Universala Kongreso de Esperanto <70, 1985, Augsburg>**“ aŭ eĉ: „**Universal Esperanto Congress <70, 1985, Augsburg>**“, mi enkondukis la malpli monstran formon: „**UK de E, 70a**“, kiun oni tamen uzu kun sama konsekvenceco! Simile, la nomoj de papoj estas indikitaj per simpla „**Johano XXIII, Papo**“ anstataŭ la komplika „**Johannes <Papa, XXIII.>**“ laŭ la RAK-normo. Ankaŭ tie oni konsekvence uzu la saman nomadon por ĉiuj papoj!

d. La biblioteko havas ĉefe esperantlingvan enhavon, kaj ĉefe esperantlingvan uzantaron. Kiam eblas elekto inter Esperanto kaj alia lingvo, preferindas plej ofte Esperanto, ekz-e en la nomoj de E-organizadoj aŭ E-kongresoj („**Brita Kongreso de E**“, ne „**British E Congress**“), de formalaj verkoj, aŭ en aldonaj notoj. Absolute nepras ke esperantaj supersignoj estu unike prezentitaj

en maniero kiu ebligas aŭtomate retransformi ilin al iu ajn alia (unika aŭ neunika) prezentaĵo, kaj kiu ebligas ĝustan esperantan alfabetigon. Nek nek estas ebla per registrado kiu aplikas la zamenhofan h-metodon aŭ kiu simple ignoras la supersignojn (kiel faras kelkaj neesperantaj bibliotekoj pri E-libroj). En multlingva katalogo, kie ekz-e komenca „E1“ povas esti artikolo (hispane) aŭ ne (esperante) ankaŭ estas oportune ne distingi artikolojn disde aliaj vortoj.

e. Tiu kondiĉo estas tre vaga, kaj kompreneble neniam oni povas plenumi ĝin plene. Libroj eldoniĝas en tiom da variaĵoj, ke neniam eblas antaŭvidi ĉiujn ajn strangaĵojn. Kiom ajn „antaŭvida“ kaj ĝenerala iu regularao estas, ĉiam ekzistas libro kiun ne eblas bone klasifi laŭ tiu regularo. Tiun saman situacion alfrontas tiu ĉi regularo same kiel ĉiu ajn alia, ĉu nacia aŭ internacia. En mia laboro pri, per, kaj por la katalogo, mi tamen trovis mian regularon tia (kaj kreis ĝin tia), ke ĝi ĝenerale bone taŭgas por la sufiĉe granda variaĵo de la 7000 titoloj kolektitaj tie.

f. La disponeblaj aparataro kaj programao (IBM-kongrua PC kun programo dBase III) metis kelkajn nesupereblajn limigojn sur mian laboron, kiun mi devis respekti. La plej grava estis la limigo de memorspaco. Grava manko de la programo dBase ĉi-rilate estas ĝia uzo de fikslongaj rikordoj. Pro tio, kaj nur pro tio, la kreo de ĉiu aldona rikordokampo signifas grandan malŝparon de memorspaco. Por bibliografia korekto mi jam aldonis la kampojn KONTRIB, SERIO, VOLUMO, ISBN, sed ĝuste pro la memorspaco mi rezignis aldoni pliajn kampojn, kiuj ankaŭ estus bibliografie necesaj, ĉefe: PARTIT por paralela titolo, ORITIT por originala titolo, PSEUD por la surlibra nomo, se ĝi malsamas disde la norma aŭ vera nomo, ELDONO, kaj DISS por apartaj indikoj pri universitataj disertaĵoj.

Alian problemon prezentis la alfabeto ordigo. Mi sukcesis per malsimpla aplikado de la dBase-aj ordig-slosiloj atingi tian ordigon kiu ŝajnis plej konvena kaj utila por esperanta/germana katalogo. Tamen ne eblis plenumi ĉiujn postulojn de la RAK-a alfabetigo, ekz-e ke „5000 jaroj de Ĉinio“ aperus sub „Kvin mil“.

Fine, rilate literaron, mi estis strikte limigita al la literaro nomata la IBM-a, pro kio suferis perdon de diakritaj signoj granda nombro da (precipe) ĉeĥaj, polaj, kaj hungaraj registraĵoj.

g. Por tiu celo mi fine surpaperigas ĉi tiun regularon.

Kiel produkton de mia plurjara laboro mi prezentis al Germana Esperanto-Asocio la prilaboritan datumaron kaj la surpaperan librokatalogon. Fakte, la rezulto de mia laboro estis ankoraŭ pli: nome, la menciita regularo pri enkatalogigo. Mi bedaŭras ke mi ĝis nun ne prezentis tiun aspekton de la laboro pli klare (kaj fakte mi ne publikigis skribe tiun regularon ĝis nun). Sed implicite la regularo enteniĝas en la datumaro mem, kiu donas abunde da modeloj kaj ekzemploj pri kiel enkatalogigi ne nur simplajn sed ankaŭ iom „problemajn“ librojn. Kiel plej ĝeneralan konsilon por venontaj katalogantoj mi do volas ĉefe rekomendi, laŭeble ĉiam sekvi la modelojn kiujn mi mem jam donis en la datu-

maro. En la praktiko, tamen, povas esti pli bone havi ankaŭ eksplicite skribitajn regulojn, kiujn mi do prezentas ĉi tie nun.

Mi volas akcenti ĉi tie ke tiu ĉi regularo temas pri la *komputila* enkatalogigo. Ĝi ĝenerale ne anticipu la decidojn kiujn faras la bibliotekisto, pastro Adolf Burkhardt, pri la bibliografiaj priskriboj. La regularo temas specife pri la aspektoj, kiel *enkomputiligi* la surpaperajn bibliografiajn priskribojn, por atingi maksimuman uzeblecon de la datumaro en komputila medio. Kiam tiu ĉi regularo diferencas de la surpaperaj bibliografiaj priskriboj, tio ne malvalidigas tiujn, sed nur adaptas ilin al la iom aliaj cirkonstancoj en komputila medio.

## 2 La bazaj principoj: Sciu bibliotekadon kaj Estu konsekvenca!

### 2.1 Baza principo: Sciu bibliotekadon!

Tiu ĉi regularo ne povas anstataŭi ĝeneralan enkondukon al biblioteka katalogado. Kiu komputile registras bibliotekajn datumojn, havu bazajn sciojn pri katalogado, pri la diversaj problemoj kaj iliaj solvoj. Specife mi rekomendas la legadon kaj komprenon de RAK-ÖB, „Regeln für die Alphabetische Katalogisierung in Öffentlichen Bibliotheken“. La reguloj farigas (mi esperas) pli kompreneblaj se oni komparas ilin kun la koncernaj preskriboj de RAK aŭ simila normo. RAK estas la ĉefa inspirfonto por tiu ĉi regularo, kaj mi ĝenerale provis sekvi ĝin, se ne en ĉiuj detaloj pro la aliaj kadraj kondiĉoj, tamen laŭspirite. Studo de RAK helpas kompreni kelkajn el la decidoj kiujn mi faris, kaj ankaŭ klarigos la bibliografiajn konceptojn ligitajn al fakterminoj kiaj „Sachtitel“, „Zusätze zum Sachtitel“, „Verfasser“, „Urheber“, „Körperschaft“, „Nebeneintragungen“.

### 2.2 Baza principo: Estu konsekvenca!

Ĉu necesas substreki refoje la gravecon de tiu ĉi principo? Se biblioteko registras plurajn verkojn de Kartezio, oni trovu ilin ĉiujn en la sama alfabeto loko, kaj ne unu sub „K“ kiel „Kartezio“, unu sub „C“ kiel „Cartesius“ kaj trian sub „D“ kiel „Descartes“. Malpli gravas, *kiun* el la tri nomoj la bibliotekisto elektas, sed estas esence ke oni ĉiam apliku la saman nomon.

Alia ekzemplo, kiam oni registras oficialajn dokumentojn de iu Universala Kongreso de Esperanto, oni kompreneble ne uzu jen la plenan nomon „Universala Kongreso de Esperanto“, jen la mallongan formon „Universala Kongreso“, jen „UK de E“, jen „UKdE“, jen „Universal Esperanto Congress“, aŭ kun numero jen „UK de E, 80a“, jen „80-a Univ. Kongr.“, jen la pli oficialaspektan „Esperanto Congress <80, 1995, Tampere>“. Elektu *unu* skribmanieron kaj apliku ĝin ĉiam.

Se infanlibro el Ĉinio estas klasifita sub *895.1 ĉina literaturo*, tiam oni ne klasifu la sekvan infanlibron el Ĉinio sub *087.5 infanlibroj*. Se antaŭa kataloginto skribis „*Hamleto. Reĝido de Danujo*“ kun punkto, tiam vi ne skribu „*Hamleto, Reĝido de Danujo*“ kun komo, eĉ se vi opinias tion pli bona. (Se viaj antaŭaj katalogantoj mem ne estis konsekvencaj, tiam endas unuecigi la ekzistantan datumaron.)

Ne provu „plibonigi“ la ekzistantan sistemon per subita apliko de novaj reguloj - tio ne plibonigos, sed rompos la sistemon.

Se iu ŝanĝo de la sistemo estas dezirinda, tiam necesas unue apliki la ŝanĝon al *jam* ekzistanta datumaro. Eble vi opinias ke „*Samenhof*“ estas pli bona transliterigo de la konata nomo ol „*Zamenhof*“, kaj volas ekuzi ĝin en la katalogo. Tamen, la sekvo estos ke la libroj de la sama aŭtoro ne plu troveblas en la sama loko. Se tamen la respondeca kataloganto konsentas ke „*Samenhof*“ estu la uzata nomformo, tiam oni konsekvence ŝanĝu *ĉie*, kie „*Zamenhof*“ aperas en la aŭtorkampo, al „*Samenhof*“.

**Sekvu la modelojn!** Tio estas simpla apliko de konsekvenceco. Se vi devas registri, ni diru, kongresan libron de la 33-a Bervalo Esperanto-Kongreso, okazinta la 13-an ĝis la 20-an de julio 1988 en Zamenburgo, vi rigardu kiel kongresaj libroj estas katalogitaj. Vi trovos en la datumaro ke mi registris ĉiujn kongresajn librojn laŭ la sama modelo:

AUTORO: *kongresnomo, numero*

TITOLO: *Kongresa libro jaro urbo*

kaj vi precize alvenos al la enskribo:

AUTORO: *Bervalo E-Kongreso, 33a*

TITOLO: *Kongresa libro 1988 Zamenburgo*

al kiu vi povas aldoni, ankaŭ laŭ la donita modelo:

SUBTIT: *1988 jul 13-20*

Sekvu ekzakte tiun modelon! Tio estas zorge elpensita formo, kiu celas laŭeble bonan retroveblecon kaj taŭgan alfabetan sinsekvon. Ne rompu la sistemon!

Tiuj bazaj principoj estas aparte gravaj pri tiuj kampoj, pri kiu okazas alfabeto ordigo: AUTORO, TITOLO kaj SERIO + VOLUMO. Pri ĉiuj aliaj kampoj, kompreneble ankaŭ konsekvenceco estas dezirinda, tamen malpli grava ol pri ĝuste tiuj nomitaj.

### 3 Bibliografia priskribo, papere kaj komputile

Ni rigardu kiel ekzemplon la bibliografian priskribon de unu bone konata libro, unue en teksta formo:

**Tolkien, J.R.R.** · **La Kunularo de l' Ringo** : La unua parto de "La Majstro de l' Ringoj" / Trad. el la angla W. Auld. Enkond. A. Korĵenkov.

Postpar. C. Fettes. – Jekaterinburg : Sezonoj, 1995. – 544 p. ; 21 cm. – ( Serio Mondliteraturo ; 3 ). – ISBN 5-7450-0457-6. – 820-31

Priskribo en teksta formo povas aperi ekz-e en librokatalogo aŭ sur slipo en sliparo. La priskribo konsistas el pluraj informeroj, kiuj apartenas al diversaj „kampoj“. Kiam la libro estas registrata en komputila datumbazo, ĉiu informero devas esti skribata en sian koncernan kampon, tiel:

AUT: Tolkien, J.R.R.  
TIT: La Kunularo de l' Ringo  
SUB: La unua parto de "La Majstro de l' Ringoj"  
KON: Trad. el la angla W. Auld. Enkond. A. Korj^enkov.  
Postpar. C. Fettes  
LOK: Jekaterinburg  
ELD: Sezonoj  
JAR: 1995  
PGX: 544  
FMT: 21  
SER: Serio Mondliteraturo  
VOL: 3  
ISB: 5-7450-0457-6  
KLA: 820-31

Unu kolekto de tiaj kampoj kun iliaj enhavoj nomiĝas „rikordo“ (aŭ ĉi tie ankaŭ „registraĵo“). Rikordo en komputila datumbazo estas kiel slipo en sliparo. Kolekton de samstrukturaj rikordoj oni nomas „rikordaro“. La kampoj ankaŭ nomiĝas „rikorderoj“. La katalogaj rikordoj do havas jenajn kampojn aŭ rikorderojn:<sup>1</sup>

AUT, AUTORO: aŭtoro  
TIT, TITOLO: titolo  
SUB, SUBTIT: subtitolo  
KON, KONTRIB: kontribuantoj  
LOK, LOKO: eldonloko  
ELD, ELDONIS: eldonis  
JAR, JARO: eldonjaro  
PGX, PAGXOJ: amplekso (nombro de paĝoj)  
FMT, FORMATO: formato (en centimetroj)  
SER, SERIO: serio  
VOL, VOLUMO: volumo, numero en serio  
ISB, ISBN: Internacia Norma Libro-Numero  
KLA, KLASIFO: klasifo laŭ Universala Dekuma Klasifo (UDK)

---

<sup>1</sup>En la Aalen-a katalogo troviĝas kelkaj pliaj kampoj, kiuj tamen ne gravas por tiu ĉi regularo.

La ĵusa ekzemplo fakte uzas ĉiujn kampojn. Plej ofte tamen okazas ke iuj kampoj restas malplenaj (neuzataj). Por verko sen aŭtoro, la kampo AUT restas malplena, ktp. Principe ĉiu kampo povas esti malplena, escepte de TIT: ĉiu libro *devas* havi titolon.

En la teksta formo de la bibliografia priskribo, la unuopaj kampoj estas disigitaj per jenaj signoj:

. : / . -- : , . -- p. ; cm. -- ( ; ). -- ISBN . --

(Anstataŭ „ . -- “ oni povas ankaŭ komenci novan linion.) Ilia rolo estas ĝuste disigi la diversajn kampojn kaj indiki pri kiu kampo temas. Ekzemple la dupunkto post la titolo ĉiam enkondukas la subtitolon, la oblikva streko ĉiam enkondukas la kontribuantojn. Kiam la kampo subtitolo malplenas, tiam oni ankaŭ ne skribas la dupunkton. Notu ke tiuj signoj *ne* estas enhavo de la kampoj! La rondaj krampoj kiuj indikas serion, *ne* aperu en la kampo SER mem! La literoj ISBN *ne* aperas *en* la kampo ISB (ili eĉ ne povas, ĉar la kampo ISB havas ekzakte 13 signojn, ne pli, nek malpli).

Malgranda komputila proceduro povas facile produkti la tekstan formon de la bibliografia priskribo el la datumbaza rikordo. Ĝi aŭtomate aldonas la ĝustajn interpunkciajn signojn.

Ĉiuj tiuj interpunkciaj signoj estas normigitaj kaj estas uzataj tiel aŭ tre simile en multaj naciaj kaj internaciaj normoj, kun la escepto de la ŝvebanta punkto inter aŭtoro kaj titolo, kiun mi mem inventis.<sup>2</sup> Ankaŭ la uzo de spacoj antaŭ kaj post la signoj estas normigita, sed tamen povas esti malsama de unu normo al alia.

## 4 La reguloj

### 4.1 La kampo AUTORO

Aŭtoro povas esti aŭ persono (germane: „Verfasser“) aŭ organizaĵo (germane: „Urheber“). En tiu ĉi kampo estas aparte grave ke la nomoj aperu en norma formo.

#### 4.1.1 Personaj aŭtoroj

La nomo de ĉiu persona aŭtoro (ne nur la unua!) aperu „inversigite“, kiel „Familia nomo, komo, spaco, antaŭnomo(j)“. Ne forgesu la komon, nek la spacon! (Kompreneble tiu inversigo okazas nur se la nomo vere konsistas el

---

<sup>2</sup>Pluraj ekzistantaj normoj uzas por tio dupunkton SEN antaŭa spaco. Tiel do nur unusola spaco distingas ke, ekzemple, „Lang Fing : El la vivo de mongola sentaŭgulo“ estas titolo kaj subtitolo de iu libro (ŝajne biografio pri iu Lang Fing, sen aŭtoro), sed „Lang Fing: El la vivo de mongola sentaŭgulo“ estas aŭtoro kaj titolo de alia libro (eble mem-biografio). Por eviti tian konfuzeblecon, mi elektis alian signon.

antaŭnomo(j) kaj familia nomo, kiel modernaj okcidentaj personnomoj. Antikvaj nomojn, kiel „Homeros“ aŭ „Dante Alighieri“, oni skribu simple tiel, sen komo.)

Papoj ĉiam aperu kiel: „Esperantigita nomo, spaco, romia cifero, komo, spaco, **Papo**“, ekzemple: „**Benedikto XV, Papo**“. Pri reĝ(in)oj, princ(in)oj kaj ekleziuloj mi ne havas ĝeneralan regulon, ĉar ili aperas tre malofte en Esperanto-biblioteko.<sup>3</sup>

Ĉu oni skribas plena(j)n antaŭnomo(j)n, ĉu nur komencliterojn, oni pri la sama persono estu konsekvenca kaj uzu ĉiam la saman formon.

Plurajn sinsekvajn komencliterojn mi skribis *sen* interspaco, do: „**Zamenhof, \_L. L.**“, ne: „**Zamenhof, \_L. \_L.**“

Pluraj personoj ĉiam aparte: do „**Grimm, Jakob; Grimm, Wilhelm**“, kaj ne „**Grimm, fratoj**“, nek „**Grimm, Jakob kaj Wilhelm**“. Plurajn aŭtorojn en la kampo AUTORO mi disigis per „punktokomo, spaco“. (En la sistemo LARS nun eble alia signo estas uzata.)

Neniuj titoloj (akademiaj, nobelaj, profesiaj, militaj, ...) kiel d-ro, prof, grafo, pastro, generalo ktp.

En la Aalen-a katalogo plurfoje aperas aldonaj informoj en ĉi tiu kampo post persona nomo, kiuj eble ne vere apartenas tie. Mi ne volas rekomendi tiujn aldonojn en tiu kampo, sed ankaŭ ne ĉiam scias pli bonan solvon. En kelkaj kazoj mi tamen povas rekomendi alternativon. Specife temas pri jenaj tipoj de aldonoj:

**1. Indiko pri la rolo:** „(Hrsg.)“, „(red.)“, „(trad.)“ k.s. se la donita „aŭtoro“ ne vere estas aŭtoro sed havas alian rolon. Alternative tiu persono povas aperi kiel KONTRIB(uant), kaj la kampo AUTORO tiam restos malplena se ne ekzistas vera aŭtoro. Tia indiko povas helpi trovi la redaktinton/tradukinton ktp. se oni nur havas alfabetan aŭtoran katalogon (kiel ja antaŭe estis en nur-slipara formo). Kun komputila uzo tamen eblas plenteksta serĉo kaj serĉo en la kampo KONTRIB, do ne ekzistas vere kialo skribi tian indikon en AUTORO.

**2. Similaj nomformoj.** Se la nomformo indikita sur la libro estas ne ekzakte la sama kiel la norma nomformo, mi rekomendas indiki la nenorman nomformon ĉe KONTRIB. Ekz-e:

AUTORO: Härtling, Peter  
TITOLO: Tia estis Hirblo  
KONTRIB: Petro Hertlingo. El la germana trad. E-Grupo Aalen

AUTORO: Mee, Lawrence  
TITOLO: La komputoro en propra fono

---

<sup>3</sup>La Esperanto-Muzeo Vieno registras kelkajn tiajn aŭtorojn, uzante la precizajn nomformojn laŭ RAK: „Matthaeus <Apostolus>“, „Karl <Römisch-Deutsches Reich, Kaiser, IV.>“, „Elisabeta <România, Regina>“.



SUBTIT: Eseo kun ilustraj^oj kaj glosaro  
KONTRIB: Lorens' Mi  
ELDONIS: Istlia [=Eastleigh-a] Eldonejo Esperantista

AUTORO: Gjivoje, Marinko  
TITOLO: Esperantonimoj  
KONTRIB: Marinko G^ivoje

AUTORO: Molle, Gianfranco  
TITOLO: kontakto  
SUBTIT: Tekstoj de la kanzonkasedo  
KONTRIB: de g^anfranko

AUTORO: Tanizaki, Jun'ichirô  
TITOLO: El la vivo de Syunkin  
KONTRIB: Tanizaki Zyun'itirô. Tradukis Miyamoto Masao k. Isiguro Teruhiko  
SERIO: Serio Oriento - Okcidento  
VOLUMO: 9

Por nomoj el lingvoj kun latina skribo oni normale uzas la nacian formon kiel la norman, ekz-e „Shakespeare“, ne „Ŝekspiro“. Nomojn origine el nelatinaj skriboj oni devas transskribi. Unu ebleco estas transskribi per esperanta ortografio, kiel Hŭang Ĝjunŭan, Ĥruŝcov, Ŝolem Aŝ, Natan Ben-Cion Ĥavkin, Efraim Kiŝon, Omar Ĥajjam(?). Laŭ tiu metodo, oni povas registri ekz-e:

AUTORO: As^, S^olem  
TITOLO: La Sorc^istino el Kastilio  
SUBTIT: Historia bildo  
KONTRIB: Salom Asch [tiel]. Trad. el juda [=jida] I. Lejzerowicz

La nomo aperas sur la libro mem kiel „Salom Asch“, sed estas origine jida. Oni ankaŭ povas elekti alian nomformon, ekz-e la surlibran formon, aŭ iun alian kiu estas ĝenerale konata, aŭ iun nomon (ekz-e esperantigitan) kiun la aŭtoro mem plej ofte uzis, kondiĉe ke oni registru ĉiam la saman aŭtoron per la sama formo. Notu ke tiuj ĉi reguloj *ne* povas preskribi *kiun* nomformon elekti kiel norman – tion decida de la bibliotekisto! Tiuj ĉi reguloj nur indikas kiel *enkomputiligi* registraĵojn kun normaj kaj nenormaj normformoj, *post* la elekto de norma formo.

**3. Pseŭdonimo (kiu ne similas la veran nomon).** Indikoj kiel „Valano, Johán (=Piron, Claude)“ aŭ „Zamenhof, L.L. (=Unuel)“ ne estas tute kontentigaj por la komputila pritrakto, ĉar la interkrampa aldono influas la alfabetan ordigon. Ideale la libro aperu en alfabetaj aŭtoraj indikoj sub ambaŭ nomoj. Tion oni povus atingi tiel:

AUTORO: Valano, Johán; Piron, Claude  
TITOLO: Ĉu ni kunvenis vane?

Tion mi tamen NE rekomendas, ĉar ĝi ne distingas inter la kazo de du aŭtoroj kaj la kazo de unu aŭtoro kun pseŭdonimo. Alia ebleco, iom pli bona:

AUTORO: Piron, Claude  
TITOLO: Ĉu ni kunvenis vane?  
KONTRIB: Johán Valano (=Claude Piron)

Tio kolektas ĉiujn verkojn de Piron kune en la aŭtora indekso, kaj ankoraŭ ebligas almenaŭ plentekstan serĉon por la pseŭdonimo.

Pli bona solvo eblus per aldona kampo PSEUD, kiun oni povas inkluzivi en la aŭtora indekso:

AUTORO: Piron, Claude  
PSEUD: Valano, Johán  
TITOLO: Ĉu ni kunvenis vane?

Momente mi ne havas bonan solvon por la problemo. Notu ke la ekzistantaj normoj havas detalajn regulojn pri „Nebeneintragungen“ kaj „Namensverweise“ por la kazo de pseŭdonimoj. Estus bone se oni povus sekvi tiujn regulojn, sed ili ŝajnas al mi tro komplikaj por esti facile realigeblaj en tiu ĉi katalogo.

#### 4.1.2 Organizaj aŭtoroj („Urheber“)

Verkoj kiuj ne havas personan aŭtoron („Verfasser“), povas okaze havi organizan aŭtoron („Urheber“). Tiuj estas plej ofte verkoj kun formalaj titoloj (vd. sube). En ĉi tiu katalogo aperas ĉefe du specoj de organizaj aŭtoroj: Esperanto-asocioj kaj Esperanto-kongresoj. (Aliaj organizaj aŭtoroj aperas malofte, ekz-e kelkfoje la Ligo de Nacioj.)

Por ke organizo aŭ kongreso aperu kiel organiza aŭtoro, necesas ke ĝi mem aŭtoris, oficiale estigis la koncernan libron. Verko kiu nur iel rilatas aŭ priskribas organizon ne nepre havas ĝin kiel organizan aŭtoron.

Por organizaj aŭtoroj (E-asocioj kaj kongresoj) estas aparte grave ke ilia nomo aperu ĉiam same! Vidu la ekzemplon pri „UK de E“ supre.

Por registri iun ajn organizan aŭtoron, la unua regulo estas: Kontrolu, ĉu jam aliaj verkoj de la sama organiza aŭtoro estas registritaj, kaj se jes, uzu precize la saman nomformon kiel en tiuj ekzemploj. Se ne, rigardu kiel estas aliaj similaj organizaj aŭtoroj registritaj, kaj sekvu laŭeble proksime tiujn ekzemplojn.

Jen kelkaj organizaj aŭtoroj kiuj troviĝas en la katalogo. Sekvu precize ĉi tiujn modelojn!

## Asocioj:

Arbeitsgemeinschaft der Spezialbibliotheken  
Brita Esperanto-Asocio  
C`eh`a Esperanto-Asocio  
Dana Esperanto-Asocio  
Dansk Esperanto Forlag  
Deutsche Esperanto-Jugend  
Deutscher Esperanto-Bund  
Deutsches Esperanto-Institut  
Heroldo de Esperanto  
Internacia Katolika Unuig`o Esperantista  
Königlich Sächsische Esperanto-Bibliothek  
Sarlanda Esperanto-Ligo  
Sennacieca Asocio Tutmonda  
Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio  
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo  
Universala Esperanto-Asocio

Skribu ĉiam la plenan nomon sen mallongigoj. Uzu la esperantan nomon, se tiu ekzistas, aŭ eble la germanan nomon, se la organizo estas germania kaj havas germanan nomon.

Tipaj verkoj de asocioj kiel aŭtoroj estas:

Jarlibro, Statuto, Regularo, Adresaro,  
Raporto de la Estraro, Libro katalogo

Kiam iu asocio eldonas libron kiu havas personan aŭtoron, tiam la asocio ne kalkuliĝas kiel aŭtoro. En tiu kazo ĝi kutime aperas kiel KONTRIB aŭ kiel ELDONIS.

## Kongresoj:

UK de E, 80a  
IJK de TEJO, 50a

Belga E-Kongreso, 54a  
Brita Kongreso de E, 18a  
Bulgara E-Kongreso, 31a  
Eŭropa E-Kongreso  
Germana E-Kongreso, 20a  
Hispana Kongreso de E, 43a  
Itala Kongreso de E, 44a  
Kongreso de Finnlandaj E-istoj, 5a  
Kongreso de la Japanaj E-istoj, 21a

Nederlanda E-Kongreso, 10a

IFEF-Kongreso, 25a

IKUE-Kongreso, 13a

KELI-Kongreso, 30a

SAT-Kongreso, 20a

Kongreso de UFE, 52a

Kompreneble eĉ kun tiuj ekzemploj povas okazi ambiguoĵoj. Tamen la sekvado de tiuj ekzemploj helpu minimumigi la nombron de ambiguoĵoj.

Notu la precizan uzon de mallongigoĵoj:

La du plej centraj kongresoj de la Esperanto-movado, UK kaj IJK, estas mallongigitaj tiel kiel supre montrite. Se la nomo de la kongreso enhavas la plenan nomon de Esperanto-asocio, tiam la nomo de tiu asocio estas montrita per siaj komencliteroj. Alie nur la vorto „**Esperant(o)**“ estas mallongigita al „**E**“. Ne mallongigu ion alian. Ne mallongigu ekz-e „**Germana Esperanto-Kongreso**“ al „**GEK**“. Ĉiuj mallongigoĵoj estas skribataj sen punktoj.

Notu la skribon de la nombroj kun „**a**“ *sen* streketo.

Se vi volas pensi pri serio de kongresoj kiel „familio“ kun komuna familia nomo, ekz-e „**UK de E**“, kaj la unuopaj numeritaj kongresoj kiel la familianoj, tiam notu ke la inversigo kun la postmetita „komo, spaco, numero“ funkcias precize kiel ĉe personaj nomoj kaj havas ankaŭ la saman efikon, nome grupigi ĉiujn anojn de la sama familio/kongresserio kune en la alfabeto aŭtoro katalogo, kun laŭvica ordigo interne de la grupo.

(Por atingi ankoraŭ pli bonan ordigon, oni povas rekomendi ke oni ĉiam skribu *du* spacosignojn antaŭ *unu*-cifera kongresnumero, ekz-e „**UK \_de \_E, \_\_1a**“.)

Indikoj pri loko aŭ dato de la kongreso *ne* aperas en la nomo de la kongreso. Sed ili ja povas aperi en aliaj kampoj (plej ofte TITOLO aŭ SUBTIT).

Tipaj verkoj de kongresoj kiel aŭtoroj estas:

**Kongreslibro, Unua Bulteno, Dua Bulteno, Oficiala Raporto,  
Oficiala Dokumentaro, Adresaro**

Memoru ke kongreso ĉiam estas la **AUTORO** de sia kongresa libro. Ĝi do aperas en la kampo **AUTORO**, kaj *ne* en la kampo **TITOLO**!

Dokumento pri iu programero en la kadro de la kongreso *ne* havas la kongreson kiel aŭtoron se ne la kongreso mem ĝin oficiale eldonis. La kongreso povas tiam esti menciata en alia kampo ol **AUTORO**, plej ofte en **SUBTIT** aŭ eĉ en **TITOLO**. Ekz-e la „**Ordo de Diservo**“ dum iu UK de E normale ne estas oficiala dokumento eldonita de la Kongreso mem, do ĝi ne havas la Kongreson kiel aŭtoron. (Plej multaj tiuj Ordoj de Diservo estas registritaj sen (persona aŭ organiza) aŭtoro.)

### 4.1.3 Geografiaj unuoj kiel organizaj aŭtoroj

Organizaj aŭtoroj povas esti ankaŭ urboj kaj ŝtatoj, aŭ iliaj diversaj instancoj, institucioj, ministerioj kaj subfakoj. Ĉefe turismaj broŝuroj en Esperanto (UDK 914 – 919) estas ofte eldonitaj de urboj aŭ regionoj – sed ne ĉiam. Sufiĉe ofte ilin eldonas iu alia instanco, turisma asocio, la loka Esperanto-grupo, privatulo, aŭ eble la LKK de E-kongreso en tiu urbo. Foje la eldoninto eble eĉ ne estas indikita. Ne-esperantistaj instancoj kiuj eldonas tiajn broŝurojn ordinare estas reprezentitaj nur per tiuj verkoj kaj ne per io alia en la Esperanto-biblioteko. Ili ja estas maltre interesaj por esperanta uzanto, kaj mia opinio ne valoras la penon, provi pedante indiki la eldonanton de ĉiu tia broŝuro kiel organizan aŭtoron. Ordinare ĉiam sufiĉas registri ilin kiel anonimajn verkojn kaj noti la organizan aŭtoron ĉe ELDONIS (kiel fakte jam okazas ĝis nun).

Ofte, la titolo de turisma broŝuro estas (aŭ komenciĝas per) la nomo de la priskribata loko, sed ne ĉiam, ekz-e:

TIT: Antaŭ vi estas Bratislava, pordego al Karpatoj, ...  
ELD: Slovakotour

TIT: Kiu ne konas Groningen, ne konas Nederlandon  
ELD: V.V.V.

TIT: Bonvenon en Kolonjo!  
ELD: Städt. Verkehrsamt

TIT: Gvidlibro pri Parizo  
ELD: SAT

Tamen intereso pri esperantaj turismaj prospektoj pli verŝajne serĉos prospektojn pri tiu urbo per la urb-nomo „Bratislava“ ol per la efektiva titolo „Antaŭ vi...“. Por faciligi la retrovon de tiaj prospektoj en alfabeto (aŭtoro) listo, ĝis nun ofte estis aplikata la truko skribi la nomon de la urbon en la kampon AUTORO. Tio ja eblas en la ekzemplo pri Kolonjo, kie fakte „Köln / Städt. Verkehrsamt“ estas organiza aŭtoro. Tamen ĉe la aliaj ekzemploj oni nepre ne skribu „Bratislava“ aŭ „Parizo“ en la kampon AUTORO, ĉar tiuj urboj ja neniel estas la aŭtoroj de tiuj verkoj! (Mi ĝis hodiaŭ ne scias ĉu „Aggtelek Jósvalfö“ estas nomo de persono aŭ de loko.)

Ĉiukaze la (eta) avantaĝo de tiu kontraŭregula truko nur validis ĉe la slipara katalogado, kaj ĉe uzo de komputilo ĝi komplete malaperas. Por trovi ĉiujn turismajn priskribojn pri Parizo, oni faru la kombinitan serĉon pri ĉiuj verkoj ĉe kiuj:

1. la kampo KLASIFO komenciĝas per „91“, kaj
2. la kampo TITOLO enhavas ie la litergrupon „Pariz“ aŭ „Paris“.

Se oni nepre volas ke turisma verko aperu en iu alfabeto listo per la nomo de la priskribita loko, tiam oni eble uzu alian trukon, aldoni la loknomon antaŭ

la vera titolo, do registri kun la pseŭdotitoloj jene:

TIT: Bratislava. Antaŭ vi estas Bratislava, pordego al Karpatoj, ...  
ELD: Slovakotour

TIT: Groningen. Kiu ne konas Groningen, ne konas Nederlandon  
ELD: V.V.V.

#### 4.1.4 Aliaj informoj en la kampo AUTORO

Aliaj informoj *ne* troviĝu en la kampo AUTORO! *Nur* tiu kiu vere estas aŭtoro, ĉu persono ĉu organizo, troviĝu en tiu kampo.

## 4.2 La kampo TITOLO

Skribu la titolon ekzakte kiel sur la libro. Se la titolo enhavas iujn personajn nomojn, tiam vi kompreneble *ne* apliku la regulojn pri personaj nomoj en la kampo AUTORO, sed skribu la nomon ekzakte kiel ĝi aperas en la titolo.

*Ne* inversigu titolon („Sankta Biblio, La“).

#### 4.2.1 Volumnumeroj

Ĉe verkoj kiuj aperas en pluraj volumoj (kie do ĉiuj volumoj portas la saman titolon kaj distingiĝas nur per la volumnumero), estas kelkfoje oportune aldoni la volumnumeron plej laste al la vera titolo, ekz-e „Das Esperanto ein Kulturfaktor 8“, „Elektitaj verkoj de Mau Zedong 4“, se oni faras tion konsekvence por ĉiuj volumoj.

#### 4.2.2 Paralelaj titoloj

*Paralela(j)n titolo(j)n* (titolojn en pluraj lingvoj samtempe) povas havi libro kies teksto estas prezentita paralele en du (aŭ pli da) lingvoj. Paralela titolo estas indikita per „spaco, egalsigno, spaco“, ekz-e:

AUTORO: Shakespeare, William  
TITOLO: The Sonnets = La sonetoj  
SERIO: Serio Oriento - Okcidento  
VOLUMO: 16

Pli bona solvo eblus per aldona kampo PARTIT, kiun oni povas inkluzivi en la titola indekso:

AUTORO: Shakespeare, William  
TITOLO: The Sonnets  
PARTIT: La sonetoj  
SERIO: Serio Oriento - Okcidento

VOLUMO: 16

AUTORO: As<sup>^</sup>vinikumar  
TITOLO: Hilbert Spaces in Intuitionism  
PARTIT: Hilbertaj Spacoj en Intuiciismo

#### 4.2.3 Originalaj titoloj

Kelkaj registraĵoj de tradukitaj verkoj indikas ankaŭ la originaltitolon, plej ofte en la kampo SUBTIT (interkrampe), sed kelkokaze en la kampo TITOLO (ankaŭ interkrampe). Mia rekomendo estas ĉiam movi tiun indikon al SUBTIT.

AUTORO: Shakespeare, William  
TITOLO: La Venecia Komercesto  
SUBTIT: Dramo. (The Merchant of Venice)  
KONTRIB: Trad. Alfred E.Wackrill

Pli bona solvo eblus per aldona kampo ORITIT, kiun oni povas inkluzivi en la titola indekso:

AUTORO: Shakespeare, William  
TITOLO: La Venecia Komercesto  
ORITIT: The Merchant of Venice  
SUBTIT: Dramo  
KONTRIB: Trad. Alfred E.Wackrill

Simila al originala titolo estas la „Einheitssachtitel“ (mankas esperanta faktermino por tio). Ĝi estas kombino el la originala titolo kaj indiko de aktuala lingvo, ekz-e „The Merchant of Venice <esp.>“. Tiu nuntempe ne estas indikita en tiu ĉi katalogo, sed estus principe konstruebla el la ekzistantaj indikoj. Mi opinias ke ĝi ne nepre estas bezonata por la celoj de tiu ĉi biblioteko. La indiko pri originala titolo estas sufiĉa kaj dezirinda.

Notu la diferencon inter *paralela titolo* kaj *originala titolo*:

Indikon pri paralela titolo oni faras se la teksto mem aperas paralele en la koncernaj lingvoj. Indikon pri originala titolo oni faras se la teksto aperas nur tradukite.

#### 4.2.4 Formalaj titoloj

Granda nombro de publikaĵoj apartenas al grupo de verkoj kun ĉiam reaperantaj titoloj kiel „Kongresa libro“ aŭ „Jarlibro“. Evidente ne estus utile registri ilin ĉiujn sub la sama nomo „Kongresa libro“. Aliflanke ankaŭ ne havas sencon provi ŝtopi ĉiom ajn da informo en la registrotan titolon, nek pedante sekvi la aranĝon de informoj sur la kovrilo de la kongresa libro mem, kiu povas varii

de kongreso al kongreso kaj ĝenerale ne estas interesa por la serĉkriterioj de librokatalogo.

La solvo de la problemo estas ke oni uzu la haveblajn datumojn por konstrui *formalan titolon*, kiu eble ne aperas ekzakte tiel sur la libro mem, sed kongruas kun la modelo uzata por ĉiuj verkoj de tiu grupo kaj ebligas kaj per sia samformeco garantias bonan retroveblecon de serĉata verko.

Tiaj verkoj kun formalaj titoloj estas plej ofte eldonataj Esperanto-asocioj aŭ -Kongresoj kiel organizaj aŭtoroj („Urheber“). Tiuj organizaj aŭtoroj do normale aperas en la kampo AUTORO (se ne estas indikita iu persono kiel persona aŭtoro), kaj ne necesas ilin ripeti en la kampo TITOLO. La plej grava distinga elemento kutime estas la jaro pri kiu temas la verko, ĉar plej ofte tiaj verkoj estas eldonataj jaron post jaro. Tial la formala titolo ĉiam enhavu la jaron post la (formala) nomo. Por kongresoj kaj similaj aranĝoj mi decidis aldoni la urbon post la jaro (iom mallaŭ RAK, kiu metas jaron kaj urbon en la nomon de la kongreso).

Por formalaj titoloj ĉiam sekvu precize la modelojn kiujn mi donis en la katalogo!

Registru do nepre:

AUTORO: KELI-Kongreso, 29a  
TITOLO: Kongresa libreto 1977 Edinburgo

kaj ne:

TITOLO: KELI-Kongreso, 29a. Kongresa libreto 1977 Edinburgo

Jen kelkaj el la plej oftaj formalaj titoloj en la katalogo. Sekvu precize ĉi tiujn modelojn!

Kongresa libro *jaro urbo*  
Kongresa Adresaro *jaro urbo*  
Adresaro de la aliĝintoj *jaro urbo*  
Suplemento de la Kongresa Libro *jaro urbo*  
Unua Oficiala Bulteno *jaro urbo*  
Dua Oficiala Bulteno *jaro urbo*  
Oficiala Raportaro *jaro urbo*  
Oficialaj Raportoj *jaro urbo*  
Invitilo *jaro urbo*  
Ekumena Diservo *jaro urbo*  
Ordo de Diservo *jaro urbo*  
Internacia Somera Universitato *jaro urbo*  
Somera Esperanto-Universitato *jaro urbo*  
Someraj Universitataj Kursoj *jaro urbo*  
Statuto *jaro de asocio*  
Adresaro *jaro de asocio*



Jarlibro *jaro de asocio*  
Kalendaro *jaro*  
Librokatalogo *jaro*  
Raporto de la Estraro *jaro*

Se asocio aperas kiel organiza aŭtoro *kaj* en la formala titolo, tiam skribu la plenan nomon en AUTORO kaj nur mallongigon en TITOLO.

Diversaj variaĵoj povas okazi, ekz-e „Kongresa libro“, „Kongreslibro“, „Kongreslibreto“, aŭ aldonoj al la formala titolo kiel „Oficiala Jarlibro“, „Florkalendaro“, „Raporto de la estraro *jaro* pri la agado de UEA“ k.s. Gravas ke ĉiu verko en sinsekvo aŭ serio kiuj apartenas kune estu registrita sammaniere, por ke ili aperu kune kaj en ĝusta laŭjara ordo en alfabetita titolo.

Ankaŭ aliajn verkojn kiuj regule aperas jaron post jaro (se oni ne preferas trakti ilin kiel periodaĵojn en aparta katalogo) oni povas trakti simile, aldonante la jaron post la ĉefaj vortoj de la titolo, se oni faras tion konsekvence.

#### 4.2.5 Informoj kiuj *ne* aperu en TITOLO

Ĝenerale, en la kampo TITOLO ne aperu informoj kiuj ne apartenas al la titolo. Specife, en formala titolo *ne* aperu jenaj informoj:

- la kongreso pri kiu temas (vd. AUTORO)
- la datoj de la kongreso (vd. SUBTIT)
- la temo aŭ moto de la kongreso (vd. SUBTIT)
- ĉiu ajn alia informo (plej ofte vd. en SUBTIT)

Ankaŭ la jenaj informoj ne aperu en la kampo TITOLO:

- la aŭtoro (vd. AUTORO, eventuale ankaŭ KONTRIB) aŭ aliaj kontribuantoj (escepte la kazo kiam la nomo estas *parto* de la titolo, ekz-e „Fabeloj de Andersen“)

- informoj kiuj apartenas al SUBTIT
- originala titolo (mi rekomendas movi ĝin al SUBTIT)
- diversaj aldonoj, komentoj, notoj, ekz-e pri eldono, represo, kvalito, fotokopio, enŝovitaĵoj, lingvo, mencioj de Esperanto ktp. (Mi rekomendas movi ĉion tion al SUBTIT aŭ al RIMARK. Eventuale oni povus krei aldonan kampon por kelkaj el tiuj informoj.)

### 4.3 La kampo SUBTIT

Krom la informoj kiuj vere apartenas al la subtitolo (laŭ RAK: „Zusätze zum Sachtitel“), kolektiĝas pluraj aliaj informoj en tiu ĉi kampo. Interalie, kiel jam menciite, kongresa dato, indikoj pri originala titolo, eldono, diversaj notoj kaj aldonoj ktp. Kelkfoje eĉ paralela titolo aŭ la vosto de la titolo mem, se la titolo estas neoportune longa.

Por eldono kaj originala titolo estus pli bone krei apartajn kampojn EL-DONO kaj ORITIT kaj movi la koncernajn informojn tien. Dum ne ekzistas tiuj apartaj kampoj, la informoj restu en SUBTIT.

Informoj pri kontribuantoj (krom la aŭtoro tradukinto, kompilinto, redaktinto ktp.) aperu en KONTRIB, ne en SUBTIT.

#### 4.4 La kampo KONTRIB

Personoj kiuj tradukis, kompilis, redaktis, ilustris aŭ alie kunkreis la verkon. Ankaŭ la aŭtoro mem povas esti ree menciata, se dezirate. Ĉi tie oni normale ne aplikas la regulojn por normigita nomo kiel en la kampo AUTORO, sed kutime indikas la nomojn en la sama formo kiel ili aperas en la libro mem, tamen sen akademiaj, militaj... titoloj.

#### 4.5 La kampo SERIO

Tiu ĉi kampo estas uzata por alfabeto ordigo. Tial estas speciale grave ke la sama serio *ĉiam* aperu en *ekzakte la sama* formo: Ĉiuj libroj de la sama serio havu *ekzakte la saman* enhavon de la kampo SERIO. Memoru ke eĉ la plej eta ŝanĝo, ekz-e punkto anstataŭ komo, mankanta streketo, troa spaco mislokigos la titolon en la alfabeto sinsekvo!

Kiam vi registras novan libron de iu serio, ĉiam serĉu unue en la katalogo por vidi ĉu jam aliaj titoloj el la sama serio estas registritaj. Se jes, kopiu precize la saman serian indikon, kun precize la samaj interpunkciaj signoj! (Laŭ mia scio, la programo LARS ofertas ĝuste tian funkcion kiu unue ofertas la kampenhavon de jam registritaj rikordoj.) Ne skribu „Beletraj Kajeroj“, se la aliaj libroj de la sama serio estas jam registritaj kiel „Stafeto, Beletraj kajeroj“!

##### 4.5.1 Parencaj serioj

Kelkaj eldonejoj eldonis/as grupojn de pluraj serioj kun parte samaj seriotitoloj. Ekz-e:

Biblioteko de Sennaciulo, Literaturo  
Biblioteko de Sennaciulo, Scienco

Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof  
Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kromkajero  
Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, parto 2a

Iltis-serioj. I. Beletro originala  
Iltis-serioj. II. Beletro tradukita  
Iltis-serioj. III. Esperantologio  
Iltis-Serioj. IV. Interlingvistiko  
Iltis-serioj. V. Scienco

Jubilea Eldon-serio. I. Beletro originala

Jubilea Eldon-serio. II. Beletro tradukita  
Jubilea Eldon-serio. III. Esperantologio  
Jubilea Eldon-serio. IV. Interlingvistiko

Stafeto, Beletraj Kajeroj  
Stafeto, Belliteratura Serio  
Stafeto, Popularscienca Eldonserio  
Stafeto, Serio Movado

Ĉiu serio el tiuj grupoj estas konsiderata kiel memstara, propra serio. La „Jubilea Eldon-Serio“ estas do, malgraŭ sia nomo, kvar apartaj serioj. En la registrado atentu speciale pri la uzo de interpunkcio (punktoj, komoj, spacoj...)!

En maloftaj kazoj libro apartenas al pluraj serioj samtempe. Tion bedaŭrinde ne eblas montri en ĉi tiu katalogo. (Krom eble kiel aldonan noton en la kampo SUBTIT aŭ RIMARK.)

Jen kelkaj el la plej gravaj serioj en la katalogo, krom la ĵus menciitaj. Sekvu precize ĉi tiujn modelojn!

Biblioteko Tutmonda  
Brosĉura Serio de LJP  
Dekspesdeka Biblioteko Esperantista  
Deutsche Esperanto-Bücherei  
Documents sur l'Espéranto, nouvelle série  
Esperanta Biblioteko Internacia  
Esperantista Dokumentaro  
Esperanto Documents, new series  
Esperanto Kolekto de la Revuo  
Esperanto Verkaro de Do. Zamenhof  
Esperanto-Dokumentoj, nova serio  
Fonto-Kajeroj  
Fonto-Serio  
Ilustrita Biblioteko  
Internacia Librotrezoro  
Internacia Mondliteraturo  
Jubilea Kolekto, Jarcento de Esperanto  
Kolekto Esperanta Aprobata de Do. Zamenhof  
La "Epoko" libroj  
Miniatur-Bibliothek  
Muusses Esperanto-Biblioteko  
Nova Esperanto-Biblioteko  
Plejado, Beletra eldon-serio  
Serio Oriento - Okcidento  
SUK-Kursotekstoj, KT

Ne skribu la titolon en krampoj!

## 4.6 La kampo VOLUMO

Por indiki la numeron en serio ekzistas la aparta kampo VOLUMO. Ne skribu tiun numeron en la kampo SERIO!

La numero normale estas skribita per eŭropaj, ne romiaj ciferoj. Indikojn kiel „vol.“, „Bd.“, „n-ro“ oni normale ne faru en ĉi tiu kampo. Kelkfoje la ciferoj havas iun aldonon, kiel „8-10“, „541/42“, „3 A“, „1 bis“. Skribu la plenan numeron inkluzive tiuj aldonoj. (La kampo estas tekstotipa, ne nombrotipa!)

## 4.7 Aliaj kampoj

En la kampo PAGXOJ (paĝoj) skribu la paĝnombron sen „p.“. Indikojn kiel „XX+305“ aŭ „20+305“ skribu tiel, ne adiciu la nombrojn! Por sondiskoj, vidbendoj k.s. la kampo povas enhavi alian taŭgan informon anstataŭ paĝnombron.

En la kampo FORMATO (formato) skribu la nombron de centimetroj sen „cm“. Indikoj kiel „15x20“, kiuj montras larĝan formaton (anstataŭ la kutima alta), skribu tiel.

Por ĉiuj kampoj validas ke oni ne aldonu punkton, komon aŭ aliajn signojn ĉe la komenco aŭ fino de iu kampo. (Tio kompreneble ne celas la interpunkciajn signojn kiuj apartenas al la enhavo de la kampo mem, kiel en „Ni vivos!“, „Que sais-je?“, „La respektema p...“.)

## 4.8 Ne nenecese duobligu informojn!

Por verkoj de organizaj aŭtoroj, ne ripetu la plenan nomon de la organizo en la (formala) titolo, sed nur mallongigon.

Ne ripetu la titolon en la kampo AUTORO (spec. geografiaj broŝuroj).

**Duoblaj rikordoj.** Ne registru la saman libron plurfoje! Por unu libro (eldono) ekzistu ĉiam nur unu rikordo en la datumbazo. Ekzistas (bedaŭrinde) pluraj tiaj duoblaj registraĵoj en la nuna stato de la katalogo, kiujn oni devos iom post iom elsarki.

**Kiel trakti tiujn duoblaĵojn?** Ĉiam, kiam pluraj registraĵoj celas *sendube* la saman libron, eblas elĵeti ĉiujn krom unu.

Ne ĉiam estas facile decidi ĉu du registraĵoj vere celas la saman libron aŭ ne. Kelkfoje du registraĵoj aspektas tre malsame, kvankam ili celas la saman libron. Tial estas forte rekomendate, konformigi ĉiujn registraĵojn strikte al la reguloj en tiu ĉi regularo. Specife tio gravas por formalaj titoloj! Tiuj reguloj celas laŭeble precize determini la aspekton de ĉiu registraĵo. Komparante du laŭregulajn registraĵojn oni pli facile trovos duoblaĵojn kaj povos elsarki ilin.

Antaŭ ol novregistri libron, ĉiam certiĝu ke la libro ne jam ekzistas en la katalogo. Prefere faru kelkajn serĉojn laŭ diversaj kriterioj: aŭtoran, titolan, plentekstan serĉon, antaŭ ol decidi ke la libro ne jam estas registrita. Kelkfoje oni ne tuj trovas la ekzistantan registraĵon, ekz-e ĉar ĝi ne laŭas la regulojn aŭ ĉar ĝi estas misliterumita. Pli bone estas do trovi la malnovan registraĵon kaj korekti la erarojn en ĝi, ol nescie krei duoblaĵon.

**Kion fari se du registraĵoj celas la saman libron, sed havas malsamajn klasifojn?** Kunigu la du priskribojn en unu, kaj kunigu la du klasifojn en la kampo KLASIFO (kiu estu difinita kiel plurobla kampo en LARS).

Specife tio validas por la notoj „**tas...**“ kaj „**tes...**“, kiuj ja ne estas iuj klasifoj laŭ UDK. Ĉiu libro markita „**tas...**“ aŭ „**tes...**“ ankaŭ devas havi veran klasifon laŭ UDK. La libro havu *unu* rikordon en la datumbazo. La noto „**tas...**“ aŭ „**tes...**“ povas aperi kiel alternativa klasifo en la sama kampo, aŭ eĉ povus esti movata al tute alia kampo kiel SUBTIT aŭ RIMARK.

**Kion fari se du registraĵoj aspektas tre simile, ekz-e diferencas nur per la eldonjaro?** Se restas ajna dubo ĉu ambaŭ enskriboj celas la saman libron aŭ ne, tiam ne eljetu! Se nur la eldonjaro diferencas, tiam versaĵne temas pri du malsamaj eldonoj de la sama libro, kiuj ĉiuj havu sian propran registraĵon en la datumbazo.

## 5 Postrimarko

Tiu ĉi regularo ne povas fine respondi ĉiujn demandojn. La reala mondo de libroj estas ĉiam ankoraŭ pli varia ol iu ajn regularo povas antaŭvidi. En problemaj kazoj oni provu per laŭebla apliko de la reguloj, analogia traktado, interkonsiliĝo kun bibliotekisto kaj komputilisto kaj fine apliko de iom da komuna prudento trovi novan solvon.

Ankaŭ povas esti ke miaj rekomendoj ne ĉiam estas plene realigeblaj en la vera biblioteka aplikado. Mi bedaŭrinde neniam havis okazon labori en la Biblioteko en Aalen mem. Provu do apliki tiujn ĉi regulojn tiom kiom ili estas efektive realigeblaj.

Mi konstatis ke, bedaŭrinde, multaj novaj registraĵoj en la katalogo malobeas la regulojn kiujn mi donis, unue implicite per la datumaro mem, kaj due eksplicite nun per tiu ĉi regularo. Reĝustigi tiun datumaron estas granda laboro, sed mi forte rekomendas ke tiu reĝustigo iom post iom ja okazu. Ju pli bonstata la katalogo, des pli utila kaj uzebla ĝi estas.

Mi esperas ke mi per la prezento de ĉi tiu regularo povas helpi al la daŭra flegado, konservado kaj uzebleco de la komputila katalogo de la Germana Esperanto-Biblioteko.

*Martin Weichert, Gotenburgo, 6-a de julio, 1996*

Mia adreso:

Martin Weichert  
Chalmers, Datavetenskap  
S-412 96 Göteborg  
Svedio

Telekopio (internacie): +46-31-16 56 55 (aldonu klare mian nomon)

Retpoŝto: [martinw@cs.chalmers.se](mailto:martinw@cs.chalmers.se)

TTT-paĝo de mi: <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/>

TTT-paĝo de la katalogo:

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/aalen/>